

La Starlinga-Ŝava alfabeto

Studaĵo de *Sergio Pokrovskij*

Versio unua: 2011-11-20

Versio ĵusa: 2013-08-08

(Ĉi tiu teksto estas kompostita por oportuna legado sur 6-cola ekrano kun la formato 3:4, t.e. 9×12 cm, kian havas multaj nuntempaj bitlibrolegiloj, kaj inter ili la mia.)

mankas: /h/, /ĝ/; la cirilaj diftongoj estas kreskaj, do alispecaj ol la malkreskaj diftongoj de Esperanto. La mankantaj sonoj ja ekzistas en kelkaj nacilingvaj adaptaĵoj, sed

- ili estas malmulte konataj – do ne prezentas evidentan avantaĝon kompare kun la literoj ŝavaj; kaj
- ili ne aspektas kiel plenrajtaj, memstaraj literoj: χ /h/, Ӗ aŭ u /ĝ/; do, ne pli bone ol la esperantaj diakritaĵoj.

Krome, la naciaj alfabetoj cirilaj havas multe pli firme fiksitajn sonsignifojn, ol la alfabetoj novlatinaj, kaj tio malhelpas ilian adaptadon al Esperanto. Tio ne helpus, sed eĉ pli konfuzus la argumentadon. (Logike oni povus prezenti la saman obĵeton pri la alfabeto ŝava; tamen ĝia malsukceso pri la angla lingvo liberigas ĝin por la interpretoj esperantaj.)

Kial ne IFA? – ĉiuj Ĥ IFA?

IFA estas interesa ekzemplo pri alfabeto bazita sur la latina, kiu tamen senkompromise atribuas precizan signifon al ĉiu sia signo. Tiurilate ĝi formas klaran kontraston kun la tradicioj de la latinlitera mondo, kaj pruvas, ke ion precizan eblas ellabori ankaŭ surbaze de la novlatina alfabeto.

Tamen ĝi estas multe *tro* preciza. Ekz-e la esperantan *e* oni povas prononci kiel [e] aŭ [ɛ], *a* povas realiĝi kiel [o] aŭ [ɔ] ktp; indiki tiajn diferencojn estas ĝena malfaciligado (krom iuj specialaj okazoj kiam oni volas prezenti specifan akĉenton ktp).

Se oni elektas la pli simplan (t.e. latinalfabetan) alofonon por prezenti fonemojn, tio povas esti misgvida, kaj probable nesufiĉe malsimile ol la latina skribo por eviti la misinfluojn:

exofandzo tŝiuzaude

Kaj la evidenta kunmetiteco de la IFA-signoj por la diftongoj kaj por *c*, *ĉ*, *ĝ* kolizias kun ilia fonologia simpleco (neanalizinda). IFA ne taŭgas por *limigi* disponeblan fonemaron, ĝi estas signaro de malpli alta nivelo ol la fonologia.

Kial ne Tengvaro? – 𐌲𐌿𐌶 𐌱𐌴 𐌲𐌺𐌴𐌿𐌵𐌴𐌹?

Tengvaro, la alfabeto el «La mastro de l' ringoj», prezentas la samajn problemojn kiel IFA: la diftongojn oni signas per kunmetaĵoj; la literformoj kodas fonetikajn trajtojn, kiuj en Esperanto ne nepre estas fonologie signifaj. Ekz-e la artikulacia diferenco inter [v] kaj [w] postulas, ke ilin esprimu malsamaj literoj, el malsamaj ĉeloj de la tengvara matrico, kaj malsamformaj; dum en kelkaj lingvoj ili povas funkcii kiel alofonoj de

unu sama fonemo, kaj en mia studaĵo pri la duonvokaloj (vd ĉi-sube, p. 29) mi prezentas argumentojn favore al tia funkciado de /v/ en Esperanto. En Tengvaro tio probable maleblus.

Krome, kontraste al la asketismo de la ŝava alfabeto, Tengvaro evidentigas emon al ekzote malsimplaj formoj kaj malnecesaj komplikaĵoj – ekz-e la superliniaj vokaloj. Tiu lasta apartaĵo postulas elekton inter la skoloj: ĉu, laŭ la aperta-silaba skemo, oni vokalizu la antaŭvokalan konsonanton; aŭ laŭ la skemo malaperta-silaba, la postvokalan. La fonetika sistemo de Esperanto sugestas la unuan; la morfologio (precipe la sufiksoj kaj la finaĵoj: *aĵ*, *at*, *em*, *ig*, *as*, *an* ...) pli bone funkcias kun la dua (aldonu al tio la fleksian ŝanĝon de aperteco ĉe *esti-estas*, *homo-homon* ktp). Pli detale vd la priskribon de esperantigo de Tengvaro en [anglalingva \(!\) artikolo](#) fare de *Eric S. Raymond*.

La alfabeto – CJJKJLr

Se alio ne estas malimplice indikita, en la ĉi-suba teksto temas pri esperantigita versio de la ŝava alfabeto.

La dizajno – CJLrJ/Ar

La ŝava alfabeto estas «apriora» (sen rilato al la tradiciaj skribosistemoj estiĝintaj surbaze de la fenica tradicio: hebrea, greka, araba, latina, cirila...); kvankam ĝi jes estas influita de stenografio (interalie, ĉiu litero estas kontinue desegnebla per unu streko, aŭ – malpli ofte – per du strekoj). Kiel oftas ĉe la sistemoj aprioraj, ĝi havas sistememan dizajnon.

Por pli facile memorfiksi la literojn, oni atentu, ke la signobildoj formas regulajn grupojn (en la priskribo mi uzos la esperantigitajn sonvalorojn):

- ◆ **literoj altaj** (kiuj elstaras super la linion) estas plejparte senvoĉaj konsonantoj
- ◆ **literoj profundaj** (kiuj sinkas sub la linion) estas plejparte konsonantoj voĉaj
- ◆ la paroj «voĉa — senvoĉa» estas prezentataj per geometrie identaj figuroj, turnitaj je 180°; t.e. p estas renversita b (aŭ inverse), simile pri t/d, s/z, ĵ/Ŝ, ĉ/ĝ, k/g, v/f; iom analogie (kvankam surbaze de alia kontrastigo) pri h/ĥ kaj j/ĵ (ĉiun konsonanton ĉi-sube sekvas la mezalta litero r, t.e. o):

ʀ ʀ	ɹ ɹ	ɔ ɔ	ʝ ʝ	ʂ ʂ	ʐ ʐ	ʑ ʑ	ʎ ʎ	ʒ ʒ
po bo	to do	ko go	fo vo	so zo	ŝo ĵo	ĉo ĝo	ŭo jo	ho ĥo

- ◆ la **mezaltaj literoj** enliniaj prezentas
 - la vokalojn;
 - la fluantojn *l* kaj *r* (ankaŭ simetriaĵoj, *c* kaj *ɔ*);
 - kaj la nazonojn *m* kaj *n* (resp. *v* kaj *ʌ*).

La kultura ŝoko – ɔ ɔɔɔɔɔ ʌɔɔ

La ŝava alfabeto ne estas ligita al iu konata tradicio; tio estas ĝia interesaĵo – kaj tio estas ĝia problemoj. Por averaĝa homo malfacilas lerni tridekon da tute novaj signoj (nur 3 literoj similas la latinajn: ɪ /i/, ʃ /s/, ʒ /z/). Necesas plurtaga ekzercado por trejni la okulon, rimarki kaj memorfiksi la karakterajn apartaĵojn de la signoj.

Konsternite de tiu alfabeto lavango, la novulo (kiu ne plu memoras, kiel li lernis la nun tiom bone konatan alfabeton latin-

an) plendas ke la alfabeto estas ĥaosa kaj malfacila (mi citas retforumajn afiŝojn):

La alfabeto mem estas malbone desegnita. Tro multaj literoj similas unu al alia kaj estas simple renversoj unu de alia, do, estas malfacile rememori kiu litero prezentas kiun sonon ...

La nacilingvaj alfabetoj distingigas preskaŭ ĉiun literon per aparta desegno (d,t; g,k; r,l). Evidente lingvistoj desegnis la ŝavan alfabeton kaj traktas lingvajn trajtojn peralfabete. Tamen, la lingvaj trajtoj distingiĝas per unusola alfabetaj trajtoj, kiu estas malfacile distingebla en rapida legado. Ĝenerale la literoj tro similas unu la alian por facila rekoneblo. Laŭ mia opinio la desegnisto tro atentis la lingvistikan elegantecon kaj nesufiĉe la legofacilon ...

Sukcesa alfabeto havas konsiderinde pli da vario. Ekz-e, la latina alfabeto havas literojn de diversaj altecoj super kaj sub norma linio. La latinaj literoj estas pli facile distingeblaj unu de alia, do,

| pli facile rememoreblaj kaj rekoneblaj.

Tiuj riproĉoj estas maljustaj kaj nelogikaj, sed evidente ili estas sinceraj. Mi ekzameni ilin unu post alia.

1. Samformaj signoj diverse turnitaj.

Tio ne estas apartaĵo de la ŝava alfabeto. Estas normala afero ke signaron oni konstruas el unuecaj grafikaj elementoj. Ankaŭ la latina alfabeto estas tia, kun diversmaniere turnitaj signoj; ekz-e jen unu latinalfabeto en 4 manieroj turnita: dbqp.

d	b	n	M	f	a	S	h
q	p	u	W	j	e	Z	y

2. La signifoj de diversaj turnoj konfuziĝas.

Tio estus justa riproĉo por la alfabeto latina: la sonvaloroj de dbdp aŭ nu estas tute arbitraj; male, en la ŝava la altaj literoj estas senvoĉaj: Ŝ /s/, 1 /t/, Ĉ /ŝ/; dum la profundaj literoj estas voĉaj: 2 /z/, 1 /d/, 7 /ĵ/ (kvankam estas 2 esceptoj: la senvoĉa ĝ kaj la voĉa \).

3. La skribo nesufiĉe varias laŭ la alto.

Malfacilas diri, kio kreis ĉi tiun malveran impreson.

En la 26-litera novlatina alfabeto duono da literoj (13) estas mezaltaj, kaj duono havas partojn eksterliniajn:

acemnorsuvwxz
bdfghijklpqty

Tio *ŝajnas* pli ekvilibra ol la 28-litera alfabeto ŝava-starlinga, kiu havas 9 literojn mezajn – kaj sekve, 18 literojn elstarajn. Tamen fakte la ekvilibro de la ŝava alfabeto estas pli inĝenia: ne duparta, sed triparta:

- ԱԶԶԾ/ԴԴԶ – 9 literoj profundaj;
- ՄԱԿՎԱԴԴՆ – 9 literoj mezaj;
- ծՇՂՁԺՆՇՇՂ – 10 literoj altaj.

(La 29-litera diftonga alfabeto priskribita ĉi-sube, p. 32, estas pli simetria: po 9 literoj profundaj kaj altaj, plus 11 literoj mezaj.)

La novlatina alfabeto havas 8 literojn altajn kaj 6 profundajn (j estas kaj profunda, kaj alta):

bdfhijkl
gjpyt

4. Iuj literoj estas nesufiĉe kontrastaj.

Mi koncedas, ke tio veras pri 11 (pt), kaj simetrie pri 12 (bd). Sed post kiam oni rimarkis la diferencon, tio ne plu ĝenas. Cetere, la novlatina alfabeto prezentas multajn tiajn malgrandajn diferencojn, kiujn trejnita okulo scipovas distingi (krom eble 11 en tiuj tiparoj):

c	I	l	cl	E	H	P	O	C	nm	rn
e	l	t	d	F	N	R	Q	G	mn	m

Supozeble la ŝavaj literoj ŝajnas al novulo similaj ĉar ili ĉiuj aspektas por li egale fremdaj. Pro la sama kialo eŭropano trovas ĉiujn ĉinojn aŭ koreojn nedistingeblaj – kaj simetrie, la eŭropanoj aspektas nedistingeblaj por ĉino. Fakte la ŝavaj literoj estas ne malpli kontrastaj ol la literoj latinaj (kaj eble eĉ pli kontrastaj).

La Starlinga adapto – $\text{c} \text{ } \text{S} \text{ } \text{1} \text{ } \text{J} \text{ } \text{C} \text{ } \text{O} \text{ } \text{A} \text{ } \text{P} \text{ } \text{J} \text{ } \text{L} \text{ } \text{J} \text{ } \text{1} \text{ } \text{r}$

La originala angla versio de la ŝava alfabeto havas 48 signojn, la literaro de Esperanto havas nur 28. Kaj la plej oftaj literoj (aŭ sonoj) anglaj ne nepre estas tiaj en Esperanto. *Ĝan Starling* tre racie ŝanĝis la valorojn de 9 signobildoj, por doni al la pli oftaj literoj de Esperanto pli simplajn formojn; aŭ por ebligi kreon de pli elegantaj ligaĵoj. Interalie li permutis la signifojn de l kaj \backslash (w kaj j , respektive j kaj $ŭ$). Efektive, la pli oftaj vortofinaj $-aj$ kaj $-oj$ en tia atribuo aspektas pli elegante (kaj facile kombiniĝas en ligaĵojn). Ĉi-sube ni atentis nur ĉi tiun sonvalore modifitan alfabeton kaj ĝiajn pluajn modifaĵojn, senrilate al la originala anglalingva versio.


La vokalsignojn Starlingo elektis tiel, ke (krom la memevidentata $l = i$) ili formas konkavan lozanĝon – se aranĝi ilin kvadrato

kaj rondiri laŭ la latina ordo alfabeta (a – e – o – u):

a) (*e*

u) (*o*


Similan figuron formas la enliniaj konsonantoj:



La starlingaj ligaĵoj – $\complement \int \updownarrow \text{C} \wedge \text{P} \text{N} / \text{C} \text{P} \text{N} \text{r} /$

Krom la literojn la starlinga adapto entenas 14 literligaĵojn, speciale esperantajn. Inter ili tre plaĉas al mi $la = \complement \int \rightarrow \complement \int$.

Tamen ne ĉiuj estas tiom elegantaj; juĝu mem laŭ la dua linio el la bildo kiun mi eltranĉis el la supre indikita artikolo de Ĝ. Ŭ. Starling:



Sur la bildo mi markis la ligaĵojn *an* kaj *on*, kiuj koincidas kun (alisignifaj) literoj de la angla versio, kaj al kiuj mi preferas

doni alian sonvaloron (almenaŭ al ɹ). Pro la posta prezento de la diftongoj menciendas la tria markita ligaĵo, tiu por *aŭ* (eksterunikoda; anstataŭe mi proponas signi la diftongon per la litero ɹ).

Ĉi-sube «la starlinga adapto» rilatos nur al la unua linio de la bildo (sen la literligaĵoj), ĉar

- tiuj ligaĵoj estas motivitaj ne fonologie (kio precipe interesas min en ĉi tiu studaĵo), sed stenografie; kaj la fonologia principo estas «unu litero — unu fonemo»;
- la unikoda normo kaj la rete disponeblaj unikodaj tiparoj tiujn kromajn ligaĵojn ne konas.

La unikoda tabelo –

Ĉi-sube aperas, laŭ la ordo de la kolumnoj:

1. La unikoda signonumero (16-ume);
2. la originala angla nomo de la signobildo, eventuale sek-vata per la sonvaloro angla en la IFA-transskribo (por la literoj kies sonvaloro estas ŝanĝita ĉe esperantigo);
3. la klavo ĉe la Emaksa enigmetodo (p. 46);
4. la ŝava signobildo;
5. la responda litero (aŭ duliteraĵo) esperanta.

La unikodaj numeroj respondas al la ŝava alfabeto ordo, kiu havas nenion komunan kun la tradicia alfabeto ordo latina, kaj iel rilatas al la grafika formo de la literoj (unue la altaj, poste la profundaj, poste la mezaltaj). Por faciligi konsultadon, mi aranĝis la literojn laŭ la alfabeto ordo esperanta (tiu de la 5^a

kolumno).

La du unuaj kolumnoj entenas krominformojn kiuj la temon de ĉi tiu studaĵo neniel koncernas; mi enmetis ilin precipe por tiuj legantoj, kiujn eble interesus la angla versio. La temaron de ĉi tiu studaĵo koncernas nur la kolumnoj 2–5.

En la tabelo aperas du kromaj literoj, kiujn la starlinga adapto ne konas, sed pri kiuj temos en la studaĵo: ϱ , τ ; dum \jmath havas alian sonvaloron (resp. U+1045e, U+10471, U+10472).

— 1 —	— 2 —	3	4	— 5 —
10468	<i>ash</i> [æ]	a	\jmath	a
10472	<i>ice</i> [aɪ]	A	\jmath	aŭ (starlinge <i>an</i>)
1045a	<i>bib</i>	b	ζ	b

— 1 —	— 2 —	3	4	— 5 —
10454	<i>thigh</i> [θ]	c	ð	c
10457	<i>church</i>	x	č	č
1045b	<i>dead</i>	d	ɖ	d
1045e	<i>they</i> [ð]	Z	ɣ	dz (mankas en Eo)
10467	<i>egg</i>	e	ɛ	e
10471	<i>age</i> [eɪ]	E	ɛ	eŭ (ne starlinga)
10453	<i>fee</i>	f	J	f
1045c	<i>gag</i>	g	ɣ	g

— 1 —	— 2 —	3	4	— 5 —
10461	<i>judge</i>	y	ɹ	ĝ
10463	<i>ha-ha</i>	h	ɤ	h
10459	<i>hung</i> [ŋ]	H	ɺ	ĥ
10466	<i>if</i>	i	ɪ	i
10462	<i>woe</i> [w]	j	/	j
10460	<i>measure</i>	J	ɹ	ĵ
10452	<i>kick</i>	k	ɔ	k
10464	<i>loll</i>	ɭ	c	l

— 1 —	— 2 —	3	4	— 5 —
1046b	<i>wool</i> [ʊ]	m	v	m
10475	<i>ooze</i> [u:]	n	ʌ	n
10469	<i>ado</i> [ə]	o	r	o
10450	<i>peep</i>	p	ɪ	p
1046e	<i>roar</i>	r	ɔ	r
10451	<i>tot</i>	t	ɪ	t
10455	<i>so</i>	s	ʃ	s
10456	<i>sure</i>	q	ʌ	ŝ

— 1 —	— 2 —	3	4	— 5 —
1046a	<i>on</i> [ɒ]	u	ɹ	u
1045d	<i>vow</i>	v	ɹ	v
10458	<i>yea</i> [j]	w	\	ũ (troa en la diftonga versio)
1045f	<i>zoo</i>	z	ʒ	z
b7	<i>naming dot</i>	`	·	nompunkto

Esperantologie pri la alfabeto –

ⱭⱮⱰⱱⱲⱳⱴⱵⱶⱷⱸⱹⱺⱻⱼⱽⱾⱿⱽⱾⱿⱽⱾⱿ

La geometria sistemeco de la ŝava-starlinga alfabeto tuj montras la konatan breĉon en la alfabeto esperanta: la orfa litero δ (= *c*) estas nepara, mankas la simetria litero ρ – kiu devus signifi *dz*. T.e.

edzo, brindzo kaj haladzo devus esti ne

Ɑⱷⱸⱹ, ⱭⱮⱰⱱⱲⱳ kaj ⱽⱾⱿⱽⱾⱿⱽⱾⱿ, sed

Ɑⱷⱸⱹ, ⱭⱮⱰⱱⱲⱳ kaj ⱽⱾⱿⱽⱾⱿ.

Estas vera, ke *dz* maloftegas en Esperanto; sed tio estas misinfluo de la latinlitera tradicio, en kiu reale multaj internaciaj

vortoj kun *dz* estas skribataj per nura *z*. Interalie, ĉiuj japanaj kaj ĉinaj *z* fakte estas *dz* : *kamikadze*, *dzen*, *Mao DZedong* ... Same pri multaj italaj *z* (*Zeffirelli* = *DZeffirelli*) ktp. Se la alfabeto de Esperanto ne estus latinlitera, la ĝustaj transskriboj ĈУVICŖŖ, ŖUΛŖ, ·VŦ ·ŖUŖŖΛŖ, ·ŖUŦUŖU estus pli probablaj (kp la rusajn *камикадзе*, *дзен*, *Мао Цзэдун*, *Дзеффирилли*).

Aliflanke, du literparoj: *ĥ ħ* (hĥ) kaj */ * (jŭ) rompas la ĝeneralan sistemon «voĉa – senvoĉa», kaj signalas pri aliaj problemoj.

La paro *h/ĥ* – ĈУ ŖŦŖŖ *ĥ/ħ*

Probable plimulto da lingvoj posedas nur po unu fonemon el tiu paro: aŭ */h/* (ekz-e la angla), aŭ */x/* (t.e. *ĥ*) – ekz-e la ĉina kaj la lingvoj slavaj.

Tamen ne malmultas lingvoj kiuj posedas ambaŭ fonemojn: la germana, la persa, la uzbeka kaj – tre grave por la leksiko internacia – la orienteŭropa (aŭ germana) prononca tradicio voĉlegi la vortojn malnovgrekajn, kiun Zamenhofo heredigis al Esperanto (*eĥo, ĥoro; Homero, heroo* ktp).

Dum longa tempo ekzistis tendenco eviti la literon kaj fonemon \hat{h} ; unu el la argumentoj estis malofteco de la parolsono /x/ en la nacilingvoj. La argumento estas malvera kaj ŝuldata al la difekto de la latina alfabeto, en kiu mankas litero por tiu sono; fakte la parolsonon /x/ havas tre multaj lingvoj, kaj la eraran impreson kaŭzas la kutimo (mis)uzi por \hat{g} i la literon *h* (ekz-e en Pinjino). La esperantigo de la ĉinaj nomoj devus uzi la ĝustan literon \hat{h} , tamen la latina bazo (kaj eble la teĥnikaj problemoj pri uzo de la ĉapelita litero) kaŭzas la misprezenton de esperantigoj: ekz-e [Hajnano](#) anstataŭ la ĝusta *Hajnano*. Ŝave

ambaŭ literoj estas sendiskriminacie egalaj, kaj ne estus motivo malpreferi la ĝustan formon ·ǵ/ΛǵΛǵ.

Duonvokaloj kaj diftongoj –

ǵǵΛǵǵǵǵǵ/ǵǵ/ǵǵǵǵΛǵǵ/

Laŭ la reganta opinio Esperanto havas pure fonologian alfabeton, kaj tial por adapti al ĝi la «fonetikan» alfabeton ŝavan sufiĉas establi pounuan interrespondon inter la alfabeto fundamenta kaj subaro da literoj ŝavaj. Tio fakte estas la principo de la starlinga adapto. Interalie, ĝi difinas j=ǵ, ŭ=ǵ.

En mia aparta studaĵo «Duonvokaloj kaj diftongoj» (disponbla [en HTML](#) kaj [en PDF](#)) mi tamen kontestas tiun opinion.

Laŭ mi, *j* kaj *ŭ* estas malsamspecaj fenomenoj. Dum *j* efektive funkcias kiel plenvalora aparta fonemo, kombinebla kun ĉiuj vokaloj en ĉiaj pozicioj (antaŭ-, post- kaj intervokale), la litero *ŭ* en la normalaj vortoj esperantaj aperas nur en *aŭ* kaj *eŭ* (la esceptaj vortoj kiel la literonomo *ŭo*, la interjekcioj *ŭa* kaj *kŭ-aks* fonologie ne estas «normalaj vortoj», kiel klarigite en la indikita studaĵo; el la vortoj kun *oŭ* nur *poŭpo* ricevis rimarkindan uzatecon, kvankam ĝi ja sentiĝas fremda, kaj estas forpuŝata de la senproblema *pobo*). Tial pli ĝusta fonologia priskribo postulas ke ĉiun el la son(kombin)oj /aŭ/ kaj /eŭ/ oni traktu kiel unu neanalizindan fonemon; kaj sekve, la duliteraj «aŭ» kaj «eŭ» estas devioj de la fonologia principo: ilin devas reprezenti po unu litero.

Alivorte, en la *Fundamento* estas malkohero inter la interna strukturo de la korpo de la lingvo unuflanke, kaj la teorio kaj

la alfabeto aliflanke. La litero ŭ ne prezentas apartan fonemon, ĝi estas diakritilo formanta la diftongojn aŭ kaj eŭ – simila al la ĉapelo $\hat{\text{c}}$, formanta la afrikatojn $\hat{\text{c}}$, $\hat{\text{g}}$.

Tiun malkoheron eblas forigi diversmaniere:

1. Enkonduki apartajn literojn ɽ kaj ɽ , forprenante la literon \backslash . La solvo konforma al la interna strukturo de la lingvo, sed devianta de la teorio prezentita en la *Fundamento*.
2. Emancipi la literon ŭ, fari ĝin aparta fonemo $/w/$, samrangan kiel $/j/$. La solvo konforma al la reganta teorio kaj la tradicia alfabeto, sed malkohera kun la reala lingvomaterialo.
3. Kombini la du solvojn, enkonduki la diftongojn kaj la konsonanton $/w/$. La solvo kombinanta la avantaĝojn kaj la malavantaĝojn de la du antaŭaj.

La nesistemaj uzoj de ŭ por reprezenti la konsonanton [w] iĝos same maleblaj, kiel la fremdaj *q* [q] en *Iraq* aŭ *th* [θ] en *Thatcher*; necesos ilin aproksimi per aliaj, propre esperantaj fonemoj; t.e. *Ŭesli* povus iĝi aŭ ·ʃʌʒɪ (*Vesli*, simile al la fundamenta *Vaŝington* = ·ʃʌʒɪʌʒɪʌʃ), aŭ ·ʌʒɪ (*Uesli*, kp *Eduardo*, ·ʌɹɪʌɹɪ, el /edward/) – sed ne ·ʌʒɪ (ĉar \ ne plu estos disponebla litero).

Ĉi-supre (p. 26) mi indikis mankon de simetrio inter *c* kaj *dz* (mankon de *q* por formi paron kun *δ*); la forigo de \ rompas la paron / \ – kiu tamen dekomence estis paro malvera.

La elemento *eŭ* – ʃ ʌʌʌʌʃ ɿ

La litero ɿ (*eŭ*) prezentus interesan fenomenon rilate al la oft-eco: ĝi aperus en relative malmultaj vortoj, sed en la vortoj

ofte uzataj; malofta leksike, ĝi estus nemalofta praktike.

Ĝia rilatumo al la pli malofta ĥ estus $\tau:\text{ĥ} = 10:4 = 2,5$ (en la Zamenhofa «Esenco kaj estonteco») aŭ $1643:705 = 2,33$ (en kolekto da artikoloj el «Monato»).

La esperantaj partoj de la *Fundamento* (se escepti la nacilingvajn gramatiketojn) entenas 257 aperojn de *aŭ* (do, ɤ) – kaj nur du vortojn kun *eŭ*, nome *Eŭropo* kaj *leŭtenanto*.

Mi traserĉis ankaŭ mian tekstaron (26 Mbajt). El la 4080 trovitaj aperoj de vortoj kun *eŭ*, 2484 (61%) estis *eŭro*-vortoj (eŭropano, eŭroj ktp); 491 (12%) estis *neŭtr*-vortoj (neŭtra, neŭtralismo ktp). Se escepti la vortojn kun *eŭr*, *neŭtr*, *pseŭd*, *leŭtenant*, restos 68 radikoj, 28 el kiuj estas nomoj propraj, precipe grekdevenaj (Deŭkaliono, Eŭfrato, Eŭgeno, Eŭklido ... Zeŭso).

Estas ankaŭ iom da pure esperantaj grafismaĵoj, kiuj en la dif-
tonga varianto perdas sian kialon:

Neŭtono, Eŭlero, Freŭdo, Pasteŭro ...

·nʌtʰɪnɔ, ·ɛŭlɛrɔ, ·frɛŭdɔ, ·pʌstɛŭrɔ ...

(kun \ w: ·nʌ\ɪnɔ, ·ɛ\lɛrɔ, ·frɛ\ɔ, ·pʌstɛ\ɔ ...)

Ili povas konserviĝi en la ĉi-supra formo, kiel ni konservas la
nomformon *Aviceno* estiĝintan el «ibn Sina» pro longa
aliskriba perado; sed pli konforma al la ŝavaj principoj estus
fonetika transskribo:

·nʌtʰɪnɔ, ·rʌjɛlɛrɔ, ·frɔjɔ, ·pʌstɛrɔ ...

(Njutono, Ojlero, Frojdo, Pastero ...)

La konsonanto \ (w) – ʍ ɸ ʌ ʎ ɹ ʌ ɲ ʌ ʃ ɹ \

La dua koheriga solvo estas ĝuste la starlinga adapto kun ŭ = \
= w:

- ŭ pensigas pri *u* kaj pri la diftongoj (*aŭtoro*, *Eŭropo*); tial ĝia uzo por la konsonanto [w] (*ŭesto*, *Ŭajt-insulo*) aspektas malagrabla;
- *w* pensigas pri la konsonanto [w], kaj ĝia apero en la diftongoj (*awtoro*, *Ewropo*, *lewtenanto*) estas egale ŝoka por la okulo.

Male, la ŝava litero \ trudas neniajn asociaĵojn, kaj \1rɔr povas senĝene funkcii paralele kun \1r.

Tamen restas alispeca, eksteralfrabeta ĉefproblemo pri ĉi tiu solvo: la granda amaso da bazaj vortoj, en kiuj al la fontolingva parolsono /w/ respondas *v* aŭ *u*, kiel en la fundamentaj *Vaŝington* = ·ɽɹɹɹɹɹɹɹɹ kaj *vualo* = ɽɽɽɽ.

La solvo kombinita – ㄐ ㄒ ㄔ ㄕ ㄖ ㄗ ㄘ ㄙ

Oni povus kombini la diftongojn ㄐ kaj ㄔ, retenante la konsonanton ㄎ (la 30-litera alfabeto):

ㄐ ㄒ ㄔ ㄕ ㄖ ㄗ ㄘ ㄙ ㄔ ㄕ ㄖ ㄗ ㄘ ㄙ

Mi metis ㄎ (w) post ㄖ (v), kaj ne post ㄎ (u) – ĉar ĝi ne plu similas la vokalon, kaj ne plu funkcias kiel la esperanta ŭ; ĉar tio similus enkondukon de *w* en la tradician alfabeton latinecan, sen forigo de *aŭ* kaj *eŭ* :

aŭtoro → ㄐ ㄒ ㄔ ㄕ, Eŭropo → ㄕ ㄕ ㄕ ㄕ

Wesley ['wesli] → Wesley → ㄕ ㄕ ㄕ

ŭo = wo → ㄕ

ŭato = wato → ㄕ ㄕ

Ŭu-han = Wu-hân → ㄕ ㄕ ㄕ

Nikaragŭo = Nikaragwo → ㄕ ㄕ ㄕ ㄕ ㄕ

Tiu sistemo kun [w] kaj [aŭ] proksimiĝas la anglan.

Samkiel la antaŭa (la 2^a) solvo konsonanta, la solvo kombinita prezentas la *Vaŝington*-problemon pri malkohero kun la baza leksiko.

Distingado inter ʌ, ɘ (aw, ew) kaj la diftongoj ɤ, ɥ estas kroma komplikaĵo; reale ĝi povas prezenti problemon antaŭvokale: ʌɤ (naŭa), sed ɤɘʌɤ (Okinawo).

Ekzemplaj tekstopecoj – ɘɤɘɘɘɘ / ɤɘɘɘɘɘɘ /

Jen kelkaj konataj testfrazoj kaj ĉiuliteraĵoj

en la fundamenta skribo,

en la starlinga alfabeto (kun ɘ),

kaj en ties diftonga modifaĵo (kun ɤ kaj ɥ).

la mondo estas gravaj sole la
rezultatoj.

למנו וזאת היא כוונתו: שכל
התוצאות / המצוינות /

Zamenhof: El la antaŭparolo
al la Dua Libro

אנחנו כותבים את זה:
פירוש · תרגום ·

La Bulonja deklaro –

ז'ורנאל ד'איןטראַן

Mi faris paralelajn tekstojn de la «Bulonja deklaro» en la
alfabetoj komuna kaj ŝavaj. Jen estas la tekstoj:

- la starlinga \-versio [en PDF](#) kaj [en HTML](#);
- la diftonga versio [en PDF](#) kaj [en HTML](#).

La tekstoj en la alfabeto kutima kaj en la ŝava estas samgradaj (en unu sama tiparo), tamen ĉiu alineo ŝava estas rimarkeble pli mallonga – ĉar tiu alfabeto estas pli lokŝpara.

Programaro – זכרונות / זכרון

Tradukaj skriptoj – זכרון / זכרון

Ĉi tie troveblas sed-programeto kiun mi verkis por traduki la literojn de la norma Esperanto el la unikoda utf8-ĉefenigujo `sdtin` en HTML-koditajn literojn de la ŝava alfabeto, kiujn ĝi sendas en la ĉefeligujon `stdout`.

Neesperantaj signoj restas senŝanĝaj. Ligaĵojn la skripto ne kreas (esperantaj ligaĵoj ja mankas en la tiparoj). La uskleco

estas ignorata (la centra punkto ne estas aplikata).

Ekzempla uzo:

```
sxava.sed < um.html > um_sxava.html
```

[Simila skripto](#) `sxava8.sed` tradukas rekte en la literojn laŭ UTF-8.

Emaksa enigmetodo – $\text{U} \text{V} \text{J} \text{D} \text{S} \text{J} \text{U} \text{A} \text{I} \text{P} \text{V} \text{U} \text{I} \text{r} \text{L} \text{r}$

Por ne tro konfuzi miajn fingrojn, mi faris por la ŝava proksimume tian [ŜŬERTĜ-klavararanĝon](#), kian mi uzas por la kutima alfabeto. Preskaŭ ĉiuj literoj estas sur la minuskla registrumo, tamen ĉar la usklecon la ŝava ne bezonas, mi liberigis la krampojn [] { } kaj ekuzis J kaj H anstataŭe. Krome, por la ne-starlingaj literoj servas A, E, Z. Vd la tabelon

ĉi-supre, p. 21.

La enigmetodon (mi nomis ĝin `sxava-ucs.el`) eblas elŝuti de [ĉi tie](#). Necesas meti ilin ien en la hierarkio de `load-path` kaj ĝin konigi al Emakso; tion eblas fari en via `.emacs`:

```
(register-input-method
 "sxava-ucs" "utf-8" 'quail-use-package
 "ŝu"
 "A method to input Esperanto in Shavian"
 "sxava-ucs")
```

La tiparoj – *с ʝ 1 0 1 0 1 0 /*

Verdire, mi trovas malfacile legeblaj la kutime uzatajn tiparojn ŝavajn. Ili tro proksimas stenografion, kiu postulas simplajn

strekojn; kaj precipe, la plimulto da tiparoj uzas la avaran spaceton kutiman en Anglalingvujo: 0.3 em (por komparo: la germanoj preferas 0.4 em, la rusoj 0.5 em; *em* estas dimensio de tiparo, kutime egala al la larĝo de ties litero M).

Por la angla lingvo tia mallarĝa spaceto estas malpli ĝena, ĉar de la Mezepoko la tradicia ortografio angla konservas la kutimon uzi specialajn ortografiajn variantojn por marki la vortofinon: *-i* ŝanĝiĝas en *-y* (baby – babies) *-au*, *-ou* iĝas *-aw*, *-ow*. Tio ebligas al la anglalingvanoj ŝpari la multekostan pergameton. Tamen la ŝava alfabeto ŝparus ege pli multe (proksimume 30% por la angla), tial oni povus uzi pli larĝajn spacetojn en tiu skribo.

Bedaŭrinde, la unikodaj tiparoj proporciaj uzas unu saman spaceton por ĉiuj skriboj, kaj ĝia larĝo estas la anglalingvuja mallarĝo. Eble tia spaceto tamen estus akceptebla se la tiparoj

estus provizitaj je konvenaj tabeloj por literkunŝovo (angle *kerning*); sed nun ili mankas.

Tia problemo ne ekzistas por la egallarĝaj tiparoj tajpeskaj:

Everson Mono, 10,5 pt:

Ŝajnas ke sagaca monaĥo laŭtvoĉe rifuzadis preĝi al Zeŭso sur herbaĵo.
Հայասն ժւ Տոյրնձ յԵԼԱՅԻՐ շԵՆՆԵՐԻՆ ԵՎ ԵԶԵՍԻՆ ԿԻՆ ԿԵՆՏԵՐ ԿԻՆ ԿԵՆՏԵՐ ԿԻՆ.
Հայասն ժւ Տոյրնձ յԵԼԱՅԻՐ շԵՆՆԵՐԻՆ ԵՎ ԵԶԵՍԻՆ ԿԻՆ ԿԵՆՏԵՐ ԿԻՆ ԿԵՆՏԵՐ ԿԻՆ.

DejaRu Mono, 10 pt:

Տայնաս կէ սագաա մոնախո Լաւտվոճէ ռիֆուզաԼիս քրէի ալ Յէւսո սուր հերբալոյ.
Հայասն ժւ Տոյրնձ յԵԼԱՅԻՐ շԵՆՆԵՐԻՆ ԵՎ ԵԶԵՍԻՆ ԿԻՆ ԿԵՆՏԵՐ ԿԻՆ ԿԵՆՏԵՐ ԿԻՆ.
Հայասն ժւ Տոյրնձ յԵԼԱՅԻՐ շԵՆՆԵՐԻՆ ԵՎ ԵԶԵՍԻՆ ԿԻՆ ԿԵՆՏԵՐ ԿԻՆ ԿԵՆՏԵՐ ԿԻՆ.

Sed pri la proporciaj la problemo restas. Jen ekzemple unu el la ĉiuliteraĵoj en diversaj publike disponeblaj tiparoj unikodaj (unue en la skribo tradicia, poste la starlinga kun la tipare difinita spaceto, poste la diftonga kun duoblaj spacetoj):

En HTML ekzistas eblo difini la larĝon de la intervorta spaceto – mi uzas ĝin en ĉi tiu retpaĝo por kelkaj blokoj en la stildosiero:

```
h2, h3, h4, td, p.verse {  
    word-spacing:0.37em;  
}
```

La preferindan grandon de la intervorta spaceto eblas difini en la inteligentaj kompostaj sistemoj kiel Teĥo (TeX); la amasaj redaktiloj kiel *Word* aŭ *LibreOffice Writer* tian bezonon eĉ ne atentigas (kvankam ili celas internacian publikon).

Unu el la oftaj riproĉoj pri la ŝava alfabeto estas ĝiaj malbela kaj nedistingebla de la literoj. Mi jam diris, ke tiu impresoparte estas ŝuldata al la stenografia aspekto de la ŝava (kvan-

kam grandparte ĝi estas simpla antaŭjuĝo). Tamen nun la stenografia flanko malpli gravas, kaj *M. Everson* faris pli ornaman (laŭ mi, tro ornaman) tiparon; jen anglalingva specimeno, tondita el [lia retpaĝo](#):

La ŝava alfabeto malhavas kursivon: oblikvigite la ŝavaj literoj iĝus konfuzaj, kaj la oblikvigitaj vortoj nesufiĉe kontrastas. Juĝu mem, ĉu vi vidas la kursivecon de la du *very*, kaj ĉu la vorto *ŝ7Ĉ* (*much*), kiu sekvas la duan el ili, ankaŭ estas kursiva en la sekva peco:

qñ ƒʀǫ vidiŬ So ƒʀoi ǎʀŉdʀʀʀe ʀ qʀʀ; ʀ Ŭ. ʀ. ʀeiŬ diŬdʀ ʀʀ So ƒʀoi
ŝĈ ĉʀ ƒ q ƒʀ ʀʀ Ŭʀ q ǎʀʀʀʀ Ŭʀ ʀʀʀʀeŬ “o ʀ.ʀ! o ʀ.ʀ! ʀ Ŭe ʀʀ ʀʀ eŬʀ!”

There was nothing so *very* remarkable in that; nor did Alice think it so *very* much out of the way to hear the Rabbit say to itself, “Oh dear! Oh dear! I shall be too late!”

Oni povas uzi grasigon aŭ substrekon aŭ koloron; en la ekzemplo ĉi-supre (p. 41 kaj poste) mi uzis grasigon.

menhofo.

La literojn mi lokis laŭ la antikva normo *Latina-3a*, tiel ke oni povas preni ajnan tekston registritan en tiu kodo, elekti mian tiparon, kaj ĝui la ŝavan skribon. Mi nomis ĝin omaĝe al *Ĝan Starling*. Tamen mi lokis la ŝava-starlingajn literojn nur en la minuskla registrumo, ĉar en la ŝava tradicio la siglojn oni rigardas afero eksterlingva, kaj lasas ilin en la latina alfabeto (simile al la ciferoj).

Mi volis doni al la tiparo iom pli solidan aspekton, ol kian havis ĝia kutime magra formo stenografia, mi faris ĝin pli kvadrata; neatendite por mi ĝi rezultis iom hebreeca (kvankam la hebreaj literoj kutime ne havas serifojn, ili estas simile kvadrataj).

La tiparo estas simpla rastruma BDF-tiparo uniksa, po 9×18 punktoj. Ĝi estas elŝutebla de [ĉi tie](#).

Bernardo Ŝavo kaj Esperanto –

·ⱭⱮⱮⱮⱮⱮ ·ⱮⱮⱮⱮⱮⱮ ·ⱮⱮⱮⱮⱮⱮⱮ

George Bernard Shaw (angla-ŝave, probable, ·ⱮⱮⱮ·ⱮⱮⱮⱮⱮ·ⱮⱮ) fakte nur malrekte rilatas al la alfabeto kiu portas lian nomon: li iniciatis kaj financis la projekton, realigitan nur post lia morto. Tamen ĉar lia nomo por ĉiam gluiĝis al la afero, mi profitu la okazon por paroli pri la homo kaj pri lia rilato al Esperanto.

Kial «Ŝavo» – ځ۱۲ «·۲۱۲۱»

Unue, pri la esperantigo de la nomo.

Apriore mi emus esperantigi ĝin laŭsone: *Bernardo Ŝoo, la Ŝoa alfabeto*. Tamen la verkisto mem kreis (anglalingve) la adjektivon *Shavian* (uzatan, interalie, por nomi la alfabeton pri kiu temas ĉi tiu studaĵo: *the Shavian alphabet*, ϩ ۲۱۲۱ ۱۲۱۲۱); li uzis *Shav* por nomi sin en sia antaŭlasta teatraĵo «Shakes versus Shav» (t.e. «Ŝeks' kontraŭ Ŝav'», «Ŝekspiro kontraŭ Ŝavo») ktp; tio pravigas la retroderivivan esperantigon *Ŝavo*, kiu jam havas rimarkindan tradicion en Esperanto, interalie ĝuste pro «[la ŝava alfabeto](#)».

Bernardo Ŝavo pri Esperanto – ·ⱭⱮⱰⱱⱮⱰⱮⱰ ·ⱮⱰⱮⱰ ⱮⱰ ·ⱮⱰⱮⱰⱮⱰⱮⱰ

Vidu pri tiu temo la anglalingvan artikolon

Vilêjo Rowe: [G.B. Shaw and Esperanto](#). “The British Esperantist”, July/August 1960.

Resume, Ŝavo restis skeptika pri la ideo de mondlingvo ĝenerale (*toothpicks like universal languages cannot move the world*) kaj pri Esperanto speciale (tro fleksia; unu el multaj kaj baldaŭ forgesota, kiel Volapuko jam nuntempe).

Ironie, lia propra projekto pri la fonetika alfabeto prosperis konsiderinde malpli ol Esperanto – kaj eĉ malpli ol Volapuko. Ne tial ke ĝi estus malbona; sed ĉar la komenca sojlo estas tro alta por averaĝa lernanto kiu malhavas sufiĉe fortan eksteran

motivon por ĝin transpasi. La sama problemo, kiel pri Esperanto.

Konkludo – ĉrΛĉrĴr

Mi diris tion komence, mi ripetu ĝin en la fino: **Per ĉi tiu studaĵo mi ne proponas reformi Esperanton.** Bedaŭrinde, kiom ajn ofte mi tion ripetis, ĉiam inter la reagoj mi legis

- ke ĉiuj reformoprojektoj de Esperanto fiaskis;
- ke la alfabeton de Esperanto difinas ĝia Fundamento;
- ke la latina alfabeto estas ĉie disponebla, dum la ŝavaj literoj haveblas preskaŭ nenie;
- ke la ŝavaj literoj estas malbelaj, nelegeblaj, inter si nedistingeblaj kaj de neniu konataj;

- ke tiu skribsistemo suferas je miskvalitoj similaj al tiuj de Volapuko (kaj eble eĉ pli gravaj).

Mi bone komprenas, ke proponi la ŝavan skribon al la vasta publiko estus afero tute senŝanca. Tro malmultaj homoj kapablas lerni originalan alfabeton sen urĝa bezono, se ĝi ne estas por ili vivnecesa.

Mi prezentas ĝin al tiuj, kiuj kapablas ĝui la intelektan ludon, kaj estas esploremaĵoj. Mi prezentas ĝin kiel esplorojn, kiel laboratorion, en kiu oni povas eksperimenti pri la lingvo kaj vidi, kiajn formojn akceptas diversaj lingvopolitikaj solvoj en tute sterila medio, izolite de la fremda latinalfabeta premo, kiam la lingvo restas lasita al si mem, al sia propra interna sistemo.

Oni povus objêti, ke interago kun la aliaj lingvoj estas esenca trajto de la projekto Esperanto, kiun maleblas ignori en ties evoluigo. Prave – sed pri tiu trajto neniam mankis atento de la esperantistoj.

Pruve ke ne temas pri reformoprojekto mi menciuj, ke la studaĵo prezentas ne unu, sed *tri* manierojn esperantigi la ŝavan. Kvankam mi persone favoras la diftongan, mi komprenas, ke ankaŭ la du aliaj havas sian logikon kaj avantaĝojn.

Certe, la tiklajn punktojn kiujn evidentigas la ŝava skribo oni povas malkovri (kaj plejparte jam malkovris) ankaŭ en la tradicia lingvoformo. Sed en la ŝava ili manifestiĝas pli klare; kaj samtempe pli klara iĝas la grafika kaŭzo de tiuj malglataĵoj.

Ekz-e la mankon de /dz/ indikis diversaj kritikantoj (ekz-e en la anglalingva [Learn Not To Speak Esperanto](#)); sed la latina alfabeto ne disponigas bonan esprimilon por tiu afrikato (krom eble la italecan *z* – sed tiun literon la lingvo bezonas por la pli necesa /z/). Zamenhofo devis kompromisi kun la prokrusta lito latinalfabeta, kaj la komparo kun la ŝava montras la prezon de tiu kompromiso; por mi tio aspektas kiel bona pravigo de la zamenhofa decido.

Nelatina grafika bazo helpas evidentigi diversajn antaŭjuĝojn – sed ankaŭ perdigas al ni la grafisman internaciecon. La transskriboj *Njutono*, *Ojlero*, *Frojdo* iom gratas mian okulon; pli facile mi akceptus la ekvivalentajn ·ʌ/ɾʌʌʌ, ·ɾ/ɔʌʌʌ, ·ɔʌʌ/ɬʌ. Eĉ pli surprize por mi: en la ŝava mi pretas akcepti la fonetikan transskribon de mia familinomo ·ɾʌʌʌʌʌʌʌʌ (t.e. /pakrof-ski/), dum latinlitere tio min ĝenas.

Afero kiun mi probable ne estus esplorinta sen la ŝava estas la ofteco de la litero τ (de la diftongo /eŭ/).

Neatendita kuriozaĵo estas ke la alfabetoj kreitaj por la angla lingvo (la ŝava, Tengvaro) pli facile esperantiĝas ol alfabetoj de lingvoj kiujn tradicie oni opinias fonetike pli proksimaj al Esperanto – ekz-e iu cirila – sen paroli pri iu el la japanaj kanaoj ktp.

· $\text{A} \text{B} \text{C} \text{D} \text{E} \text{F} \text{G} \text{H} \text{I} \text{J} \text{K} \text{L} \text{M} \text{N} \text{O} \text{P} \text{Q} \text{R} \text{S} \text{T} \text{U} \text{V} \text{W} \text{X} \text{Y} \text{Z}$

Sergio Pokrovskij

· $\text{A} \text{B} \text{C} \text{D} \text{E} \text{F} \text{G} \text{H} \text{I} \text{J} \text{K} \text{L} \text{M} \text{N} \text{O} \text{P} \text{Q} \text{R} \text{S} \text{T} \text{U} \text{V} \text{W} \text{X} \text{Y} \text{Z}$

Novosibirsko

2013-08-08